
fidilalao f. henriel

# DUON -



# - ete

Memeldono
Antananarivo Aŭgusto 2015

# DUON-
# e t e

*dediĉe al tiu, kiu frenezigas amanton …*

**Kopirajto©memeldono Antananarivo Aŭgusto 2015**

**En tiu ĉi poemkolekto vi ne trovos verkaĵojn, kiuj nepre sekvas kronologian ordon. La aŭtoro metis iun poemon post aliaj tute hazarde. La kialo estas ke ĉio nur ĉirkaŭas, trafendas, eniĝas la amon por finfine fandiĝi kun ĝi. Nur la inspiro ordonis al li verki kaj esprimi sentspuron, kies fenestron, nun, li apenaŭ apertis …**

**Kundividi kun vi la saman onon, kiu eble torturas kaj… feliĉigas ankaŭ vin ĉiutage …**

Dure dure eliras vorto
pendiĝas son’ ĉe tremema lip’
el kor’ vibranta je am-agordo
ŝvito parolas dum koncip’
Vorto --- tamen tute magia
pri emo, pri amo, pri inklin’
kiu espimas al l’ alia
ke ŝia estu mi sen lim’
Kia heroeco ĉe tenera batalo
kia salto al idilia land’
kie ŝi ŝnuros min per ŝtalo
kie min havos okulrand’
kaj centfoje tordiĝas lango
dum ironie ŝi ridetas min
suĉante tortursukon el la sango
el mia jam bolanta pro tim’

**<u>03.03.2003</u>**

## PRETER LA TOMBOJ

Kaj preterkuras bus'
forgesante...
Tie, aliflanke de l' valo
iesuloj ĉiame nutras florojn
per siaj revoj mil en karnofalo
en sterkon ili modlas plorojn sub foliflirto kaj
florment'

Tombar' blanka, angul' lacerta
sed amon ili ja tiam provis
per ek-ioma kis' , per okul' certa
feliĉo, tristo enkoren ŝovis
ĉu rezigni ? Nu, maltrafis tent' !

Kaj gaje trakuras bus'
ignorante,
ke, belo, povo, fid' aŭ ĝojo
vane tralikas kiel rosa larmo
iliajn spurojn per nerekta vojo
balais ni –- ĵaluza karno ---
kies ostaron ankaŭ korodos temp'.

He, momenton !
ĉu ne veluras viakore
pro susur' oarista ?

**<u>04.12.2002</u>**

# DUONVORTE

eterne kuŝos en mi sekretoj
pri amo, pri murd' aŭ pri krim'.
Sanktaj. Kaj ilin per mil epitetoj
silent' ornamos ĝis la fin'.

atentu ĉar nur al vi tio dirindas
--- fidinduloj --- kies eco dissemi grajnojn
fikcie similas al tiu de Judas'
pri kio komplezem' poluras ŝajnon.

nur al vi direblas ti'
eston on-ete apertu mi.

**19.05.2002**

## INFANET’

Dormu, dormu, mia anĝelet’
jen vizaĝo pacradia
en sonĝo profunda
kie paradizas ĉio.

Senzorgo regu vian mondon
vi, bubo libera ĉe mond’ krada
Sonĝu, ja ŝonĝu infaneto mia
pri la plej steluma nuno
pri morgaŭ’ de stulta ul’
pri ludo, kaj pri kiso dolĉa
pri panja kuko dum feri’
feston kreu en paca revej’
kvietigu batalon ĉirkaŭ vi.
Dormu sonĝe vian tutan vivon
estu for de ĉi real’ mizera

por mia infanet’
mia *Protektat’*

**06.06.2002**

## MI FORLASAS

ĉi lokon tiun mi forlasas
post ses jaroj da ir' aŭ reen
ŝvito, polvo, fiŝo, anas'
kiujn mi eltenos pro obeem'
ornamadis la kamparan vivon.
Estu benita la forirtago
laste vidatas ĉaro kaj bov'
finos bildo pri haŭta plago
dum nuda banado kaj ekmovo
far bubar' kondamnita jam.

Adiaŭ varma ĉielo, blua suno
"  Ĝis iam  "   fekunda grund'
al ĉiuj la ridetmielo
ankaŭ hipokritaĵo en abund'
ĉiun taksas mi laŭ valoro.

Sed porĉiame mi memorigos
amikecon de iu modestulo :
sub polvo l' enŝovita oro

**<u>17.08.2002</u>**

## ATENDO

Atendo
kial atendo entas  ?
vivo devintus glisi kontinue,
horizontigi sian vojon
same kiel akvo kiu riveras,
kiu plaŭdas ĉe rokmamoj.
Atendo obstaklas vertikalas
lineeco malglatas
ŝveliras tempo nehaltigebla
trafluante vian staron.
Atendo
kial atendi
ĉu pro io manka en paseo
ĉu por kapto al futur'  ?
Malamika atendo
el kiu fontas  timo,
angoro kaj minaco
ĉar dubon signifas atendo
laŭsence ankaŭ nescion
esper' aŭ fid' ne viŝos tion
la kred' ja malplie.

…/…

Atendo insidas insistas
trude ĝi nepras
dume, vi batalas
rivalo de vi mem.
Kiel punkto inkandeska
foruziĝas la konscienc'.
Atendo apertas
sed neniam ŝlosas...'

**<u>31.08.2002</u>**

# ANTAŬ VIZAĜOJ

Vizaĝojn postas vizaĝo
jen gajeco de l'infanaĝo
bubo sukcesis ekzamenon,
kio transas al la mieno.
Jen knabino, kiu ege tristas
anstataŭ promes', ve ! la forlas'
far tiu knabo la plej amata
ŝi solas ... ja graveda.
Kio okazis al tiu ĉi viro ?
fajrmienas li pro admiro
antaŭ belaj juveloj ĉe vitrino
kiujn deziras lia virino.
Ho, avinjo, tien vi testudas
ignorante pri kio mi aludas
kaj fajfante pri vivdoloro
« Venos mort' ne antaŭ horo ! "
Jen ina okulo, kiu larmas
infanojn, ŝuldojn; ĉio en amas'
prizorgenda pro divorco
eskapis heroo sen iu vorto.

Sin sekvas vizaĝoj kiel muta filmo
ĉiun mi provas kribri
trabori sekreton kaj trasondi
eble por kunsenti ilian doloron
sed, ho ve !
ĉion mi ne rajtas scii.

**<u>29.07.2002</u>**

# NI ĜOJU

Ni ĝoju pri julia venko
post ses monatoj da fid' en lukto
da timo, angoro pro kiu la frukto
rikoltiĝas sen ia ajn pento.

Ni ĝojas pro la matura reago
de l' saĝa popolo kia Malagaso
ĉiama Neanto de l' hat - ama raso
spitis inciton far triba drako.

Ni ĝoju lecioni al nia idaro
defendi, ĵaluzi pri LA elekto
primokoj anstataŭ respekto ... malgrave !
liberecon egalas nenia varo.

Sed ne ignoru nian heroon :
rezervistoj por kiuj la omaĝo,
por vunditoj kune kun ostaĝo
ili iniciatu novan eraon.

**09.07.2002**

## DEK JAROJ POSTE

Dek jaroj poste
kie vi nestas
kio vi iĝas
amikoj de l' junaĝo ?

Preskaŭ ĉiuj geedziĝis
kaj bubojn naskis
varon negocas
iu alia ĉe firmao
tiu estas estrulo
kamparano, masaĝist'
dum ŝi penadas kudri.

Tempo fulm-atomas
disiginte nin
faskodirekten
kiel tion ordonis sorto
laŭ fuŝo de l' ambici'.
Iu sukcesis lukti
dum kotvive dronas mult'.

Stiranto aŭ kuracisto,
id-orfulo, kvininfana,
malhonesta aŭ piulo,
ĉiujn mi vindos enkore
ĉiujn mi sanktoleos
herooj de mia pasinteco
rolantoj en fiera legend'.

**27.08.2002**

# N U B O J

Vesperas la somero
nur la pluvminaco
grize frisketas
kaj okulojn ekkaptis nuboj.
Kia stranga pastaĵo enĉiele,
modlita kvazaŭ frenezume !
Aŭ dratformas aŭ, kiel spongo
post bruliĝo, ŝvelas nuboj.
Nubo speguloza ĉe kontur':
jen nazo mestiza
jen jesuokrista menton'
jen faŭko iom monstra.
Dume, neniu knedis la plej supran
blankon, (Por kiu mi vizie enviis)
oron ĉe pinto, plumbon ĉe angul'
bunta --- tamen netretebla --- reliefo
pura fascino kontraŭ hipokrita metaleco
diste ĝuinda neĝo de l' sudanoj.
Nub' unu etaĝas aliajn
de la nigra peza kumulus'
al gracila leĝera cirus'
kies faskradioj malfruas
sur la flanko de mia vizaĝo.

**06.01.2002**

# KIU “ *NI* “ ?

Delive ni kutimis kalkuli dedekstre
sed oni lernigis al ni l’ inverson
Ni kutimis frazumi pasivforme
malo postulas « subjekt’ verb’ komplement’ “
Plej aĝulon ni kutimis respekti
anstataŭe regas monhavul’
Ni kutimis interkonsenti pri ĉiuj aferoj
sed mortigas nin senlima pov’
Ni kutimis kutimi sed instruiĝis poste
ĉion malordigi.
Ni malkutimas.
Kaj ni perdas la kutimon, kio perdigas nin,
kiuj ja perdiĝos  :
nek ankro, nek gvido, nek referenc’, nek esenc’
nek modelo, nek identec’, nek neko, nek nenio
Tial ni neniom sentas
Tial ni kapablas malstari kaj malmoviĝi
Tial ni okulvitras fronte la mondon
Tial ni koruptiĝas cede al mon’ poste pov’ poste honor’
Tial ni ne plu estas ni
Tial la nepluo ... nur siluete ... lue ... ete ...
se tiel nin indus nomi.

**<u>23.12.2001</u>**

# MALJUSTE    KONTRASTA

Serenas firmamento
kun ties majesta senfinec'
Montpinton banas ombro
de l' vespero mildema
Kvazaŭ ĉio primokus nin
baraktuloj pro febro
kiuj muĝas senvoĉe.

Jen denove la vento friska
Ĉu por mildigi nian inferon
aŭ alporti plian vermon ?
Serenu, sereniĝu firmamento
indiferentu antaŭ niaj zorgoj :

dekstre bebo pulme spirfajfas
delive iu alia forne varmas
apude febluleto spitas morton
dum iun kvaran dolor' mutigas.

Nokto malhelas
Vento ululas senlule
Kaj niaj buboj davidas
fronte goliaton.

Serene serenas firmament'

*je la 09a pm en la hospitalo de Tsaratanana*

**<u>01.10.2001</u>**

# NE VEU

Mia lando
Kvindek jarojn vi sencele vadis
tra la koto kun la sama elan'
dum viaj infanoj foje sin persvadis
ke ni trafis vojon al Kanaan
Sed ironias la sorto.
Filo post filo rege fitrompas,
fisuĉas vian riĉaĵon per sia tuta forto
fianĉiĝas kun perfidema ras'.
Malriĉo, friponaĵo, ada ŝtelo
vipas tieulojn indajn je kompat'
Al nepotismo adicias koktelo
de filistroj kiuj sintenas kiel rat'.

Ne veu lando mia.
Jen energie moviĝas junular'
kleras nia ruz', ja fortas la fid'
Spitas ni por ŝanĝ' en januar'
ne nur de l' jar' sed ankaŭ de gvid'.

**<u>02.12.2001</u>**

## LA URBO DE MIL

Morne fleksas la reĝina urbo
sub rigora puŝo de l'vintra vent',
kiu grizajn suden alpelas nubojn.
Vizaĝon sagetas mil pikeroj
sed palac' olda plej suferadas.
Ĝin envolvas ja nebul' peza
nur supre svagas stampkontur'
kaj senkompata frido unuigas nin.
Via spit-fiero dorlotas min,
dumtreme vin admiranta.
Fumecas etos' konkeri ĉi monton
ventblekon, eĉ minacan, rumore frontas
fidelaj subanoj de l'ebenaĵo.
Baldaŭ vin malkatenos hel'
per forviŝo al invad-spuro.

**10.09.2001**

# A R T O

Arto krei
poeme poezii
al vorto --- eĉ unu --- provizi
forton
spiron
valoron, dignon
rolon, devon, doloron
kaj vivon malfikcian por
la mondon konkeri
per liberigo el la mem' ...

**06.11.2001**

**I**

Doloro insidas konkere
mil piketoj, alfluas pussuko
konstantas
persistas treme febliĝ'
Ĝemi.Torporo. Ronrona muto
de l' torent-streĉo. Sangprema,
kaj jen aspiro al bonfarto.
Jen turmentito, kiu rimorsas
la kvietan tagon. Sen zorgo
sin amneziinte pri la fragila karno.

II

Okazo pensiga dum kiu,
la morto preterhaŭte kisas vin
kvazaŭ kato ung-kaŝema.
L'esenco tenere tralikas el medol'
pli intimas anĝel' nigra
plej senvuala la pramister'.
Antaŭe, neglekti baniĝi
en feliĉrojo
profiti el la luksa vivdonac'.

…/…

III

Ni eliras vivlimon
kie morto randos kaj nin frandos
malvole la vertiĝo antaŭ l'abismo
de malkutimo ( aŭ timo  ? )
falgliti al la nepriskribeblo.

Malsano.
Natura fenómeno,
kiun spitas homoj
pro fiero --- angora  ! ---
eternumiĝi.

**.05.2001**

Povrulo
tialas via verda lern'
iun serĉi kun kiu leterumi
spite al afrank-obliĝ'
Esper' helpon tepidulan
ĝis takso prialmoza
ĉar nululi ĉegene
Nigra povrul'
tial strebi gramatikumi
kredante je famili' ideala
sed mizeras ankaŭ via rev'
fidi naivan kortuŝon
el manoplena sanktular'
Povra afrikul'
tial persiste kursi
kaj inventi movadkialon
ja misas lingvo sen tia forto,
kian vi ĉerpas el memo via
tial, tiele trovi motivon,
kiun adopti viamezure
ĉies fronti antaŭjuĝon
enigi lingvon familien
klopodo iga por monperilo :
plant bred eksport vend
subitos iam l'elreviĝ' !

Ulas veo
malvenk' nefina
malgraŭ nia elitular – svarmo

Nigrul' povra
vin kredas neniu.
Krom ĉi spegulo
mia.

**<u>17.02.2001</u>**

Montaro ĉenbaras horizonton
Tiel l’anim’ sufokas sin
Nub’ ŝvebas ĉe l’blua mar’
Joviale primoketas vin.
Alizeo blovas ŝiadirekten
Sed ĉu eĥos lamento via?
Tion kredi ŝajnas rev’
Sud-orienten, sud-orienten.
Traboru tiun gigantan vualon
Je promes’ ankaŭ ŝi ŝuferas
Amspuron parfumis vort’
Kaj per ties brovoj larmumaj
Silentis ŝia susura konfes’.
Kvazaŭ bildo vivus pense :
Sidanta paro antaŭ rizkamp’,
Impete revenas l’ JES’ facila.
Ĉu finfine ŝi rezignaciis,
Kiu ja perdis el tiu batalo
Ĉu lernint’ ĉu ul’ sperta?
Eble tiu ĉi saĝa, kia li sin kredis.
Tamen, ne gravas ! Ne tiom ...
Ŝi ja scias la tutan veron,
Kiun elbuŝigis ŝia venkint’
Pelmele mensogas la nuna sorto.
Vi pli amas ŝin ol tio direblas
Eĉ dista korpe, proksima la kor’
Pacienc’ fid’ esper’ plor’
fajron vivan enblovas
Ĝis atendad’ unujarcenta.

**29.09.1997**

# DONĴUANUM’

Kion vi revadas sur branĉ’ nepenta
Tio estas la sama. Dezir’ kateni koron anĝelan
Ebriigi korpon aspir’ fidelan
Forlogi ineton al am’ eterna
------ memore je tiu senkulpa kis’ -----

Vi kredas kiĉa l’Alia kiu stumblas
Eĉ vin ĉenumas edzin’ mutema
Ĉu konsider’ ĉiopermesa
Instigas vin servile flirti?

Sed delive eskapas ombro:
ne-enretebla juvelin’
El mano tremema ŝi forglitis
Fajf-rankoras antaŭ via razi’
Ŝin animas ja liberec’
sur fojn’
kiel
fajr’ dancanta

Kaj svene laciĝas kor-ludisto
Ŝrikume trepidas vundkompan’
Riposti nepras ... Ve ! distas fol’
Plej mincas ŝanco pri resaniĝ’

…/…

Senjor’ ! Forgesu sapuman bulmiraĝon
Koŝmare latuna stikos idol’
( Insolente ? ) blufas la ver-veron
Blasfemiva incitemul’

Ringocirklas temp-eroj
Kor’ postkore ĝemdoloras
dum fieras defipugno
Ignorante ke l’ batal’ ---
silent’
similas al
soleca venk’

Repago magra
por ĉifita kor’

**<u>.00.1998</u>**

Plendo riproĉas al ŝi nun,
Kiu rompis amon sen pun'
Ŝi vivon ludi ja provis
Ne koron regas kompromis'.

Jam rimors' trudiĝas sinen
Ŝin envolvas kruda rimen'
Ĉe solec' eĥas severa skold'
Tralikas larm', falis herold'.

Kial inventi tian inferon
dum ambaŭ suĉravis someron ?
Ne fierulas mi sed, he, veanto
suferanta je lamenta ĉanto.

Sed obstine naivas cel'
al renaskiĝo de l' jama miel'
Interne min dampas vive
lirlad' de amo kaj lascive.

**05.06.2000**

Kio okazas al mi ...
turmente mi imagas ŝin
ŝiajn pensojn
gestojn
pri ŝia senkiala mutiĝ'
provas mi deŝiri vualon
dubo naskiĝis
timo pri am-rompiĝ'
ĵaluzo pri iu rival'
Kio okazas al mi ...
kvazaŭ ne satigita
tamen am-alŝut'
ade pruvita per inemo
Ne trankvilas mi
ŝi eskas ombron
neenreteblan
gliteman
preter la olda karn'
ŝancelas mia fid'
je neniu alkroĉiĝi
ĉu valorus lukti ...
Ŝi ja jamas for
mejlojn dista
...................

**20.11.1999**

Memoras mi pri l’ tago tosta
ĉar jam ligitas al ĝi mia viv’
Horo je ĝojo pro naskiĝ’
kaj de l’ korpo kaj de l’ am’
Ja ne sufiĉas tiom da vortoj
Kiel esprimiĝi l’ interna sent’ ?
Nu, Belafino sufiĉe scias
ke ne ŝanĝitas la tiama promes’
Mature sintenas kuniĝo nia
Unu l’ alian ame fidelas
surlipen stampas mi l’ simbolon :
«Feliĉan “ por vi « datrevenon ! “

**<u>23.01.1999</u>**

# ŜLOSIĜI

Lasu ŝin silenti
Eble sufiĉe suferis koro ŝia
pro miaj vortoj vanaj
vortoj --- kiel promes’ miela.
Lasu mutiĝi ties lipar’
tiam promesinta pri fidelec’
jam suĉinta el frukto milda
ho ve ! aliulo ĵus forŝtelis.
Lasu pripensi ŝia nuna am’
pri l’ paseo ja turmentiga
pri mensog’ malica ĉu perfid’,
kiun mi estus farinta al ŝi.
Kaj kial ne pri tiu vundpuno,
kiu donace brulas en mia kor’ ?

**ŜTONE**

**24.10.1999**

Pro amo ni disiĝis
Abrupte viŝiĝas el via koro
La varma ink' de l' infanec'
Kaj senpove ĉeestas mi malvenkon
ĉar de vi fontas potenc'
Al vi permesate 'stas enŝovi
la ŝlosilon de l' kor' bojlanta
funden al panja puto
Infan' forlasita de pleja amikin'
estas mi nun
tiel sola ludante polvon.
Pro am' ni disiĝas viadire
tamen stranga disiganto,
kiu ne spitadis malfacilon
kiel perlo falsa ĉe lumbril'.
Se nur pro tio ĝuste persistus mi …

**12.05.1999**

Mi ŝuldas dankon, kara
pro tiu vort', oh', malavara,
el fundo de via hermeta kor'
spruĉis ĝoj' tiel same dolor',
al mi vi igas nesekreta
aman kialon kiu estas ne eta
mi daŭre esploris la veron
nun, ekardigas vi esperon
de l' kor' soleca
Dankon kara !

Ĵurpromesis mi protekti
koron kiom donacas vi
pli ol tio: mi ade strebos
konkeri la amon kiel Kolos'.
Spite je mia febla korp'
batali fronte al la sort',
kiu ĉiam malfavoras nin
--- dankon koran, kara ! ---
feliĉulo nestos sur via sin' !

Tamen, ni ambaŭigu la forton
ja reciproku bezonan senton
tiel venkos am' kune sincera,
kies potenco fariĝos fera.

**05.11.1999**

.

*dediĉe al tiu porĉiame perdota amikineto...*

Strange dorlotemas mia nuna sent'
Ĝuas mi la spactorturon
Distancon plenigas ebriiga silent'
Sur kota vojo mi bridas spuron.

Ĝojigas min penso pri ŝia amo
Naive tempon allasis mi rabi min
Vento lulas ĉe patrina mamo
Sed kruele doloras sen amikin'.

Ŝi estas tie, kien aliras birdo
Tie ĉi almoze krucumitas korp'
Ene luktas amo kontraŭ flirto
Senindulge sintenas ŝi antaŭ orf'.

**22.05.1997**

## MI JAM  ŜANĜIĜIS

El nova fonto mi ĉerpis novan senton
Same kiel tiun de ĵusnaskita homo
Antaŭe, mi taksis la mondon tia,
Tiel malvasta kiel egoismo mia
Sed nun --- ankoraŭ ĉi matene ---
Konscias mi pri l' ŝanĝiĝo
Ne tiu de la mondo sed de mi mem
Mi jam ŝanĝiĝis en mia interno !
Denove ekbrilos en mi la fido
La certeco kaj memstar'
Eble des pli humana ol homa ĝis nun.
Ĉu daŭros ties efiko, ĉu ne efemeros
ludo je kiu mi kutime submetiĝis ?

*Den Haag* **26.06.1996**

Se nur l' paseo fantomus en koro
suspiranta, tra vitro de larm'
videblas l' interno turmentita,
mi ravintus esti en revo envulta.
Se nur la dolĉa mieno, kies
kisoj mielgustis ĉe l' buŝ' soifanta,
komplezemus je porĉiama alĉenum'
kun la sort' -------- sed
alia estas la real'
brilas la luno kun radi' malvarma
lazuro de krepusk' flagrigas la eĥon
de l'iamo kiu ŝmiras la muron.
Ĉu ne povas ponti eĉ unu sekundon
pluvgutoj al tempo forfuĝema ?
La penso, tamen, rifuzas la ludon
en kiu spegula memo algluiĝas kun korp'.

**<u>16.03.1996</u>**

Kiam la promeso aliiĝis en mensogon
Kaj de l' eĥo perfida nutriĝis la kor'
rezignema, tiam forvaporas l' vualo nigra,
kiu ĉikane fitrompadis novicon.
Kiel demonino Adamon allogis,
tiel mi spertis imagon miraĝan
kvazaŭ tenita enkaĝe baraktis mia pens'.
Sed rid' primoka estas ĉe la sojl'
revenigas min alfronti la realon.
Kia realo tamen ? Enbuŝe amara kiam
ekreenas l' iam' en ludon suĉeman.
La nuno pli vakuas simile al abismo sveniga
de kie neniu sanktul' venos min helpi
Plie:  serenon postĥaosan venenas solec'.

**<u>11.05.1996</u>**

Nebuliĝas l’ ideoj en kap’
Svarme turnantas nevidebla ero
kaj la dancmovo animas la cerbon
Dum en doloron sinkas malagord’
kiel ordoni bridi ĉevalon
disiren kurantan pro abrupta fol’ ?
Sed l’ areno suferas kaŭze de tio
l’ujeta areno de l’ kranio.
Ho ! Veas la povra turmentito,
kiun submetas l’interna besto
trairante reen sur glitglat’
La tiesanto en si mem fremdiĝas
Li svene okulumas kvazaŭ antaŭ klif’.

**<u>30.03.1996</u>**

Ŝajnas longa la vojo del kor'
Ĉe monto serpentas riveret' de l' am'
mano ĉenita estas mano por ĉiam
ne eblas ŝtopi furoron de vapor'
Kaj del  pasinteco l' iama kiso elmergas
tenere turniĝis la valso de bapto
tiam, kiam ni similis en kapto
Pri bolanta sento mi nokte verkadas.
Hieraŭ, en blua firmamento
Radie brilantis luno perfekta
Interne ploris eĉ se ĝoje aspektas
la mieno kies sorto estas lamento.

**12.09.1995**

*dediĉe al Ikuko el Japanio*

# VANA

Vana estas tiu amikeco de hieraŭ
Nun mia koro ege ekŝiras
La rememor' pri ludo kaj rid'
Eĥas strange en mia povra kap'
Vana estas tiu amikeco natura
Kiun naskis kunvivad' efemera
Tiam la luno ĉe l' rivero
Duone brilis kun muzik'
Kaj la vento alportis esperon ...
Vana estis tiu kruda amikeco
Kiam manon mian tuŝis ŝi
Ĉar la sorto disrompis ligon
Kies inicinto estas jam for
Tamen, mi ŝatas tiun kruelan amikecon
Ĝi plivarmigas mian koron.

*Prago je la 6a 20mn am*

**27.07.1996**

# VOJO APUD LAGET'

Mi ĉiutage trairas
Vojon ĉarman flanke de laget'
Tie staras birdoj en amas'
Blankar' kvazaŭ neĝoret'
Mia vivo alĉenas vojon tiun
Tri rakontoj superkuŝas ĝin.

Sekvinte la vojon frumatene
Kolegiano estis mi, kun vagantin'
Senzorgema, eĉ inklina al ne'
Okulploranta se for l' amatin'
Troviĝis mi en reala sonĝo
Nekredeblas ja tia enplonĝo.

Kaj kiam fariĝis mi soldato,
Tiam lageton mi preteriris
Forgesinte la spiron de aromato
Okuloj blindaj, kor' ŝtoniĝis
Ĉiam okupita pri la devo mita
Ne eblas eskapi el mond' fermita.

…/…

Sed nuntempe, jam plenaĝul'
Mi matene aliras la vojon
Tute malvarma kiel spegul'
Memorante paseon iun fojon
Funebranima pro nostalgi'
Larmas l' okuloj, for l' energi'.

Ho, mia vojo kara
Vi spuras viveron
Postsignas ĉe polvo deŝir' amara.
Ho, kara laget'
Ĉu aŭdiĝas mia suspir' ?
Batas samritme sango kaj silent'.

**.12.1995**

## SEN(A)MUZE

Mi fidis je iu Muzo efemera
Eĉ folitremeto inspiris min
Tiel same tenero aŭ plor' karcera
Sed nun, jam venas la fin'.
Mi kredis je dieca knabino
Por kiu eĉ sanktul' sin dronas
Perfidaj okuloj tranĉas sen timo
Koron ebrian, kiu ame ŝin kronas.
Ĉu daŭros la sufer' ?
-- Ne ! Findecidas viktim' –
Kaj li kiel mi mem suĉas la sukon
el grundo sterila : turmento de senamul',
Plu sekiĝas la font'. Inspiro ŝvebas
elrete saltanta kaj ĉikanoj sinsekvas.
Kiu fakte knedus am-paston ? Mi trovos tamen
flakon, kiu glisigos min surpapere.

**<u>28.02.1997</u>**

*dediĉe al mia franjo OLGA*

Franjo
Solecas mia viv'
Vakuas
Kvazaŭ min jukus nostalgio
Paseo fatamorganas ĉe horizont'
Via ridet', tia lasta spuro
Sin trudas dolĉamare
Tra diafanan vivkradon...
Kaj denove...
Vakuas
Tiom pezas la silent'
Dorlotaĵojn reeĥas vent',
kiujn ŝatus mi envolvi
Ĉirkaŭ Nuno ĉikane triumfa
Sed vanas mia pen'
Franjo
Korŝiron kompensis vi
Vundon flegas spir' sidera
Vi stikas esperon el polver'.

**26.02.1997**

Kisu susure la kolon
Forgesu doloran mienon
Amo jam ekflamis
en koro feliĉoplena.

Enspiru aeron balsaman,
kiu igas svena infanon
Etan virgulinon blankan
Ne tuŝu tian neĝan revon.

**24.03.1995**

*dediĉe al S.L.*

Ĉu vi ignoras angoron en mia kor' ?
Pro okuloj kaj voĉo inda ĝi skuiĝas
Kvazaŭ torenttremo, ja torent' plus dolor'.

Ĉu kulpus vortoj se ili flankensencas
Trairante labirinton kie mensogas ŝajn' ?
Kaj l' oreloj ŝtopitaj, vi tortureme potencas.

Ĉu vi mokforgesas ke mi amas vin,
Ke viaj piedsignoj gluindiĝas sur paperon
Kiel memoraĵon pri tiu susura intim' ?

**<u>10.03.1997</u>**

# DISDE MI

Jam ŝanĝiĝis mia viv'
Tiel same ankaŭ la via
Vi --- silentema pro amrompiĝ' ---
Mi --- sentimentale --- nostalgiis
L' alian ja fremdas l' unu
Kaj ambaŭ timos malplenon.

Kompenscele mi babilsimiis
dum aŭskulti etiketis vi
Mi lascive ekstrabis,
Miarekten, ve ! okul' morna.

De nun plifajnas sent' necerta.

**<u>13.07.1999</u>**

Ho, amo
Tiom kantas pri vi poet'
Tiom da kisoj esper' plor'
Sinsekvas en ŝvelanta kor'
Jes, ŝin amas mi. Magia vorto
Entenanta mian ne tutan animon.
Ho, amo
Ĉu doloron indas plu sekreti ?
Al kiu konfesus mi inferon,
kiu jam kondamnas min soleci ?
Ho, amo
Venos la tempo al liber'
Triumfas sklav', kiun viktimis sort'
Tiam, denove kuniĝos ambaŭ
Aspirantoj al etern – umo.

**22.05.1997**

## *N E N Y*

Karulinon, mi tiun elektis
Cele al komuna viv-vojaĝ'
Koro mia en ŝian plektiĝas
Nia am' similas al feliĉa naĝ'.

Hejme printempi pro inda idar'
*Neny*... *Neny* mia
Ĉiam nur vi aŭ ... Neni'.

**...2001**

## Fragmente al amatin'...

...kvankam for de vi, de via tenera ĉeesto, pasas eĉ ne unu sekundo dum kiu mi ne pensas pri vi, vian plej belan konturon mi bildigas. De nokt' ĝis matenrando, nur pri vi sonĝas mia senpeka intim'. Mi amas. Mi amas vin. Vin adori, admiri, diinigi sed, ŝajne, tion vi ne sentas. Indiferente vi rigardas min kvazaŭ al nekonato vi alparolus. Vi ludas mian amon; artisme vi ete po et' dozas la torturon. Certe, amas vi, sed por reliefigi la amon, vi montras forton. Vi potencas antaŭ l'amanto febla. Eĉ mi plezure gustumas el tiu ampokalo, tiom arde kiom amaras ties venen'. Mi rezignacias, eble ĉar mi scias la de vi latentan amon. Kaj mi konscias ankaŭ pri tio, ke kvankam akirita de mi, vian amon mi devas kaj re-konkeri ĉiusekunde kaj flegi por ke ĝi estu pli fajna, pli fajra, pli vera. Ke ĝi estu mia. Ke ĝi estadu Mia.

…/…

Ho, mia neforgesinda, ambaŭ fandiĝas inspirite de l' blu' en ĉiel'. Venos la tempo kiam laciĝo regos vian koron, enuo triumfos ĉiujn argumentojn, tamen kredu ke mi restos la sama, iom naiva, poetema . . . tia, kia vi ĉiam konis min. Ankaŭ amon mian. . .

de via servuto,

**10.06.2000**

# DEK SES JAROJN…

Kiel  roj-naskiĝo el la montflanko
mi fluis subiren al verdaĵo
tiel, vi ĉe subo akceptis min
post deksjara pacienc’.

Vi – eta lageto de l’ebenaĵ ’ –

Grundon ambaŭfand’ trakuras
Por fekundi feliĉon
Dekses jaroj efemeras
Ensorbitaj en eternvakuon.

Ĝis kiam ?
Ja ĝis la limo de l’ pasio,
Pro torento iesa
Elverŝos miakoren
Kor(od)oza larmo.

**02.10.2003**

Vane mi ĉerpas el puto
de l'inspir'
enas sterilo
Muta l'amsusur'
Neniu bru' el sangocirklo,
kiu vejnas en mi
Nul eĥ ' el kor' dezerta
el vento malespera
blue pezas tiu benita ĉiel'
Mi enuas. Mi laciĝas
miri
pri mia neniec'
Mi timas skleroziĝi
ĉar ne flakas eĉ funde

**06.10.2003**

## LERNU REZIGNI

Jam pasis temp' ĉion regi
ĉion mastri kiel solhavant'
ankaŭ aliul' rajtas flegi
ŝian amon – kun konkerĉant' !

Tamen, persistas spura amo
pro, eble, mispaŝo novica
sed liakoren tralikas de mamo
viv-aromo, iom ome laŭvica.

Lernu pardoni, lernu je pacienc',
rezigni simile al pacribelo.
Jam promesiĝis rekompenc':
ne gumindas vi de ŝia fabelo.

**02.02.2004**

seka, dezerta, sterila
silenta, muta, funebra
surda, ŝtopita
febla                inerta
sensuka
nigra                svaga
cirkla, nenioma, vana

jen poezi' nemalhavebla
nur kalm-altruda
al animo
lulita per nula konscio
mola fronte kosman ebriecon
prefere morti
en l'eterneco de nenifar' !
en tiu misfloro de malbono

**<u>16.02.2004</u>**

*dediĉe al Narovana kely*

etulo preĝu
via voĉo sinceras antaŭ Di'
ankaŭ Ekscias Li vian tonon,
kies similon ne rivalas anĝel' !

etulo preĝu
apenaŭveka konsci' pri mond' infera
Kiel kantbalbuto recititas pet'
" Benu, benu vojaĝon paĉjan ! "

etulo preĝu
antaŭ ol sonĝi ĉe panja sin'
eĉ fore sentas mi vian vibron
pro via pledo, Di' Favoros min.
preĝu, preĝu, ho, etulo mia...

**<u>17.02.2004</u>**

*dediĉe al Mrs*

Mildas via voĉo
tiel same ankaŭ la gest'
kaj l'okuloj ĉinetas dormeme
kvazaŭ tuta vivo via estus nur revi.

Mildas via koro
- ho kiom bonŝanca ties havant' ! -
tiu kispalpas la vizaĝon
reliefon magian fingroj karesas

Tion senĉese bildigos mi
ektuŝi vian konturon
leki la mincan skulpton de via lipar'
Promesite ! Tion prisonĝos mi
ĉi-nokte mem
Ne veku min ĝis mia satiĝo !

**.<u>01.2005</u>**

Provas mi mortigi la muzon
Por ke ĝi formortu kun mia am'
Ĉiam vidas mi ĉie ian akuzon
Pri ĝu' pekofara en flam'.
Provas mi forviŝi spuron
Forblovante eĉ amaran cindron
Bildo primoka regas futuron
Mi daŭre vizias amektindron.
Provas mi sed vane provi
Tranaĝi alfluon de amroj'
Koro ne scias **KIAL** trovi
Silentmotivon antaŭ sia boj'.

**<u>21.01.2005</u>**

# NAIVA PUPO

Vi estu mia kara pupo
amata, dorlotata, ornamita per bela vest'
en mia nest'
kaj sen gest'
vi gapu al mi.
Am' elkora inundos vin
nostalgie ludas mi pro belaj tagoj
pri verda fago
el kiu mia sago
akra, vin trafis ĝustaloke.
Pupo ne ĝemu nek ribelu
nur ĝuu la fingron lipĉitantan
kvankam bolantan
eĉ mallantan
koron vi havas, premita de mi.
Mi rajtas ami iun alian
sed min bonvolu ne tuj forlasi
ĉar via pasi',
ĉar mia mani'
estas revi.
Vi estu mia kara pupo
amata, dorlotata, lulata kiel solinfan'
ĝis nur kiam
vin delasos man'..
Pli allogas ja moda felis'.

.

**<u>03.03.2005</u>**

Kiel  maro superkape
ĉielo gastigas lunon
sed jam perdis mi la lumon

Kaj rapidiĝis la am’ eskape
del laŭ ŝi karcersimila
fajfante pri mia reteno humila

Okulojn luno fascinas
el ili blinde fluas perl’
klaras nokte funebra tern’

Lunbrilo lancinas
ĉe nub-ondo tutebria
mi mortis foje du- aŭ tri-a

**<u>20.02.2005</u>**

## KRIST – MASKO

Oni kantas ke Kristo naskiĝas
Sed ĉu Li ne mortos sub la premo
De tiuj varoj komercendaj
Ĉu Li ne bruliĝos sub tiuj fajroj
Mil, kiuj brilas surbranĉe
Oni kantas ke Kristo naskiĝas
Kun la ĝojo de l'infanoj en la mondo
Kun la fervoro de ĉiuj preĝantoj
Flanke de l' rutinema negoc'
Aŭ de tiuj kredantoj daŭre hezitemaj
Oni kantas ke Kristo naskiĝas
Ankaŭ en tiuj malriĉaj landoj
Ankaŭ sub la varmaj steloj de nia hela nokt'
Ankaŭ sine de l'sovaĝa kri '
De tiuj, kun kiuj mi kundividas suferon
Sed mi ja kantas ke Li naskiĝas
Por vi, por mi, por l'aliaj
Kiuj ne kredas je tia fantazi'

**<u>29.12.2006</u>**

## AL TIUJ, KIUJ MORGAŬ MALVIVOS

De la frua mateno ĝis la vespero
Mi perlaboras monon kun espero
Ke iom mildiĝos la hejma infero
Ke valoras mia ĉitaga sinofero
Spiti febron el fajrema kancero
Silente ene de mia utero

Daŭre ploros l'etulo soifa
Ĉar la mamoj sekiĝas kiel dezerto
Infanoj lamentos pro ventra verm'
Kiu intestan tordos malplenon
Junuloj revoltmutos je malsat'
Paĉjo kaj mi vid-evite penon digestos
Ne mortos ni ĉi tiun nokton
Kie malhelon ni edzigas al sufer'
Sed je krepusk' okazos nova batalo
El kiu eliros ni --- venkitoj senglavaj
Kontraŭ malamikon, kiu regas nian sferon

Kaj daŭras mi obstini labori
Malgraŭ pikdolora sang-elfluo
Miaj infanoj krios laŭte ĝisagonie
Junaj ventroj kreviĝos pro malpleno
Restos ni ja malvivaj ĉi tiun tagon
Kaj eble mortos morgaŭ samhore

**<u>17.12.2006</u>**

# KIEL SIZIFO

Denove la ŝonĝo en mia koro
Kvazaŭ kondamno
Al am' efemera, absurda, mortiga
Kvazaŭ kondamno
Al soleco pliposta
Kiel en l' antaŭaj travivaĵoj

Viaj manoj karesadis miajn
Dum mia nazo snufis vian kolon
Kvazaŭ kondamno
Al gesto mielgusta, fajrema, lasciva
Tiel ni ambaŭ laŭis sovaĝan riton
Sine de l'naturo komplezema

Vin mi amas
Ĉu ne estas vana diro,
Kiun vi jam sciis
Kiun mi jam eluzadis
Kvazaŭ kondamniga sentenc '
Cele al mia vivtorturo ?

Sed malgrave !
Mi fermos miajn okulojn
Mia koro estas aperta
Profitante el la nuna ĝu-lulo
Kvazaŭ kondamno
Sizifigi mian fivivon

**<u>22.04.2007</u>**

Vi rifuzas erupti kiel l' unuan fojon
Povra koro laca je amoj
Tamen sinceras ŝia deklaro
El buŝo infaneca
Kredindas ja ŝia akcept'
Kiam konfesitis la sekreto

Ĉu daŭre doloras la lasta pun'
Aŭ ŝtoniĝas la mol' en vi ?
Kompatinda koro
Mia povra koro

**22.04.2007**

.

Nepre elirendas el tiu rivero de amo
Kiu senhalte subeniras laŭ vojo de sort ‘
Kiu kuntiras min al sia ravino
Ĝis kiam mi finfalos tien
Kaj oblafoje ina mano forprenas min
Revivigantan el malesper’
Dum sekundoj jarcentaj ravis mi
De ŝia tuta esto mi suĉnutris
Sata, feliĉa la povra kor’
Sed iam la rojo rekuntiris min ravinen

Realo kaj sonĝo torturas min
Realo kaj sonĝo miksiĝas
Senpove mi vadas kontraŭflue
Vane mi alkroĉiĝas al via branĉeto
Ho bela judasino de mia revo !

**22.04.2007**

Ekribelu, ho sklavo de koro
Ene tro premas vin arda ond’
Vin frandas interna voro
Far vermo de l’ina mond’

Ekribele eruptu mio
Vin ĉenas amo nelica
Kiel ĉasulo la simion
Eskapu el tiu naso novica

Bruligu ribele la nodŝnuron
Per kiu vin strangolas am’
Kuraĝe transsaltu muron,
Kiu vin katenas en sia flam’

**28.04.2007**

## *Omaĝe al mia amiko Hans Bakker…*

Mesaĝon pri hom-frateco vi transdonis
al samideanoj de mia kontinento
kaj la de vi nefinita labor' nin ordonis
finplenumi taskon kun hom-ama sento.

Kaj giganta estas via faro
ho, Sizifo de la verda mond'
vi kredis sen ia ajn fanfaro
ke movi monton kun mara ond'
eblas
ja skuiĝis nia kara Afriko...

Bakker ja ade bakis brikojn
verdajn por homara domo
en kiu vi kaj mi kunvivados
uzante komunan lingvon
sed pli ol tio :
por pli da justeco
niaj koroj kunbatos.

Do, homa adiaŭ' por vi, kara amiko !

**23.01.2015**

Post la romano <u>*HEROO DE L'ĈIUTAGAĴO*</u>, kiu proponas al la legantoj vivrakonton de iu ŝtatoficisto en Malagasio, <u>*DUON-ete*</u> estas la dua libro originale verkita en Esperanto de FIDILALAO F. HENRIEL. Plimulto de la sesdeko da poemoj en tiu libro traktas la temon de amo. Amo, kiu sentigas al la poeto jen efemeran feliĉon jen doloron sekretan, do amo en ties simpleco kaj homeco.



FIDILALAO F. HENRIEL studis en la pedagogia trejnejo *Ecole Normale Supérieure* (ENS) Ampefiloha, sekcio de la Universitato de Antananarivo. Post tio, li profesiis kiel instruisto de la franca lingvo por liceanoj. Tamen pro familiaj problemoj, li forlasis la ŝtatoficistecon kaj starigis sian propran Esperanto-gazeton <u>*Panoramo de La Granda Insulo*</u>, komercas kun esperantistoj en Ĉinio kaj profesie instruas Esperanton al malagasaj gejunuloj kadre de la internacia projekto *Esperanto Plus*. Cetere, Henriel starigis la unuan Esperanto-retradion en Afriko, nome *Aminda Radio Esperanto*.

Henriel kunlaboris kun la revuo <u>*Monato*</u> dum pluraj jaroj, li kunverkis ankaŭ gvidlibron en la malagasa lingvo por helpi neesperantistojn akiri utilajn informojn pri Esperanto. Krom tio, li verkis Esperanto-lernolibron por Malagasoj kaj estas preparanta la vortaron Esperanto-malagasy.